La libro de la semajno

"Nuda inter lupoj"

de Bruno Apitz

Prezo 12,- GM

PILO-PRESS

Internacia Informa Servo

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 463649; 514269

N-ro 17/1974 15 majo 1974
Aperas ĉiusemajne

## Walter Scheel - nova federacia prezidento

Bonn (pp) Per la absoluta plimulto de 530 voĉoj Walter Scheel, federacia ministro pri eksteraj aferoj kaj aganta federacia kanceliero de FRG, hodiaŭ estis elektita nova federacia prezidento de FRG. Li ekprenos sian novan oficon la 1an de julio 1974.

Walter Scheel kune kun la iama kanceliero Willy Brandt realigis la novan germanan orientan politikon, kiu kulminiĝis en la traktadoj kun Sovetunio, Pollando kaj GDR.

Kiel ministro pri eksteraj aferoj de FRG li kelkfoje montris sian simpation al Esperanto per salutvortoj al internaciaj Esperanto-kongresoj, ekz. al la UK en Portland kaj la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Luksemburgo 1974.

En sia hodiaŭa posttagmeza radio-ĵurnalo la Esperanto-redakcio de Pola Radio jam raportis pri la elekto de Walter Scheel.

**************

## D-ro Klaus von Dohnanyi - ne plu ministro

Bonn (pp) Laŭ gazetaraj raportoj la honora protektanto de la 59-a Universala Esperanto-Kongreso en Hamburgo 1974, d-ro Klaus von Dohnanyi, ne plu estos federacia ministro pri klerigado kaj scienco en la nova registaro sub la kanceliero Helmut Schmidt, kiu estos elektita la 16-an de majo 1974 en la germana "Bundestag".

## Willy Brandt al la UK

Hamburgo/Romo (pp) Laŭ informo de RADIO ROMO de la 28 aprilo 1974 la iama federacia kanceliero Willy Brandt, prezidanto de la Social-demokratia Partio de Germanio, transdonis al la Universala Esperanto-Kongreso jenajn salutvortojn: "La 59-a Monda Kongreso de Esperanto 1974 kunigas en Hamburgo homojn de diversaj lingvoj venantaj el diversaj landoj, sed kiuj, tamen, sin komprenas pere de komuna internacia lingvo. Jen interkompreniĝo inter la popoloj en la plej vera senco de la vorto. Mi estas tre ĝoja, ke Federacia Respubliko Germanio kaj aparte Hamburgo estos la renkontopunkto de ĉi tiu kunveno, kiu kunigas la popolojn. Mi salutas ĉiujn partoprenontojn de la 59-a Monda Kongreso de Esperanto kaj kore bonvenigas la eksterlandajn delegitojn kaj gastojn. Mi bondeziras al la kongreso sukcesplenan disvolviĝon." - Willy Brandt ne plu estas federacia kanceliero. Ĉu la nova kanceliero, venanta el Hamburgo, Helmut Schmidt, dediĉos novajn salutvortojn?



**Normanda Esperanto Kongreso**

La post-lerneja Centro de Grand-Quevilly estis la kadro de la Normanda Esperanto-kongreso, organizita de la Esperanto-fako de la Laika Amikaro Batié-Calmette-Salengro. Dum tagoj esperantistoj venintaj el tuta Normandio praktikis Esperanton en ĉeesto de japana esperantistino, f-ino Kazue Sugariara. La kunvenon ĉeestis deputito Tony Larue, urbestro de Grand Quevilly, kaj liaj kolegoj de la urbkonsilantaro, al kiuj dankis s-ro Quillaud, prezidanto de la Normanda Unuiĝo kaj s-ro Gibaux, vicprezidanto. (Vidu la supran foton!)

## Japanaj esperantistoj en Pekino

Pekino/Tokio (pp-uj) La 15-an de aprilo 1974 japana Esperanto-delegacio konsistanta el 8 personoj flugis el Tokia Internacia Aerhaveno al Pekino via Hong Kong. Ili restis ĉirkaŭ 2 semajnoj en Ĉinio kaj post Pekino vizitis Ŝanghajon kaj aliajn urbojn. La arango koncerne ĉi tiun viziton estis plenumita de la Asocio por Japana-Ĉina Kultura Interŝanĝo en Tokio laŭ invito de Ĉina Esperanto-Ligo.

La japana delegacio konsistis el jenaj esperantistoj:

Ĉefo: D-ro Naoki Toita, prezidanto de Kjuŝiu E-Ligo, honora profesoro de Kjuŝiu Universitato;
Vicĉefo: S-ino Yukiko Isobe, direktorino de la Japana Esperanto-Instituto, prezidantino de la Esperanta Virina Asocio;
Membroj: S-ro Eizo Itoo, prezidanto de la E-Propaganda Asocio kaj de Universala Homama Asocio;
S-ro Rokuro Tokuda, prezidanto de Ŝizuoka E-klubo;
S-ro Ĝisuke Takanaka, estro de Takenaka E-librejo;
S-ro Joŝio Koseki, direktoro de Japana Esperanto-Instituto, Lektoro de Miĵi Universitato en Tokio;
F-ino Joŝino Tanaka, konsilantino de Japana Esperanto-Instituto, komitatanino de Esperanta Virina Asocio;
S-ro Jukijoŝi Muramacu, konsilanto de Japana Esperanto-Instituto

## Biblioteko de Germana Esperanto-Instituto

Bissingen (a. Bk.-pp) Dank' al la klopodoj de s-ro Staege, eldonisto de la konataj kalendaroj pri floroj kaj bestoj, la biblioteko de Germana Esperanto-Instituto fine estis transportita de Gechingen al la nova sidejo: 7311 Bissingen, sen kostoj por la Instituto. La biblioteko daŭre serĉas malnovajn gazetojn kaj revuojn ĉu interŝanĝe ĉu donace. La biblioteko estas vizitebla laŭ antaŭa telefona arango: (07023) 6230.

Radiaj komentoj de d-ro Josef Kondor al Pilo-Press: En Pola Radio mi aŭdas ofte kaj ĝoje de kaj pri vi! Gratulon, pluajn sukcesojn! Radion Vieno mi ofte kaptas sabate vespere, sed ne tute forte, klare. Radion Roma lastan dimanĉon mi sufiĉe klare kaptis per 31 m ondolongo. Bern dissendas laŭte, klare.

## ESPERANTO EN LA RADIO

Esperanto-Nachrichten – Wien
des ORF Auslandsdienstes auf Kurzwelle

Esperanto-Informoj – Vieno
de ORF-poreksterlanda servo sur mallongondo

La Esperanto-Redakcio de ORF, Wien, sendis al PILO-PRESS leteron de la 13-a de majo 1974, en kiu oni povas legi interalie: "Elkoran dankon pro la notoj en via "Pilo-Press", per kiuj vi ne nur efike atentigis pri niaj disaûdigoj, sed ankaû rekomendis ilin prijuĝante kun fervoro nian laboron kaj jam atingitan – kvankam ankoraû modestan – sukceson. Tio estas por ni ne nur ĝojo, sed antaû ĉio alia: kuraĝigo, kiun ni bezonas, ĉar niaj cirkonstancoj ne estas tro facilaj....."

La leteron subskribis d-ro Karl Beckmann, unu el la du Esperanto-parolistoj kaj verkanto de felietonoj kaj raportoj.

Pilo-Press alvokas siajn legantojn kaj ĉiujn esperantistojn subteni la laboron de la ankoraû "juna" Esperanto-redakcio de ORF per regula – aû almenaû ofta – aûskultado de la sabataj resp. dimanĉaj Esperanto-elsendoj el Vieno.

Jen denove la tempoj kaj ondolongoj:

Sabate je 17,45 ĝis 17,55 h por Eûropo je 6155 kc = 48,74 m;
por Aûstral- kaj Sudorientazio je 17780 kc =16,87 m

Dimanĉe je 6,45 ĝis 6,55 h por Eûropo je 6155 kc = 48,74 m;
por Sudorienteûropo je 7250 kc = 41,38 m
por Sudorientazio je 21705 kc = 13,82 m

Krome la regiona programo de ORF dissendas ĉiun kvaran sinsekvan merkredon Esperanto-programon sur meza ondo 203,4 m je la 13,30 ĝis 13,45 h. Cetere hodiaû je la 15 maj okazis la laûvica elsendo!

Skribu al Esperanto-Redakcio de ORF, P.O.Box 700, A-1041 Wien, Aûstrio.

La pasinta sabata elsendo disaûdigis post la ĉiam interesa kaj aktuala komentario de d-ro Alfred Macher sonbendan paroladon de ambasadoro Ralph Harry, Bonn, pri la kulturaj rilatoj inter Aûstrio kaj Aûstralio. En tiu elsendo Ralph Harry deklamis poemon de la aûstralia ambasadoro en Vieno, kiun li mem tradukis en Esperanton

**********************

<u>Varsovio</u>. Jam pli ol unu semajno Varsovio nun elsendas sian ĉiutagan vesperan elsendon, kiu estas bone aûdebla sur meza ondo kaj ankaû sur kurtondo 49 m. Prezentiĝis ankaû unuafoje la Esperanto-ekspreso laû la nova programskemo. La dimanĉa vespera ekspreso nun ankaû aûdiĝas en plena versio, kio certe trovos la konsenton kaj ĝojon de multaj aûskultantoj, kiuj ne povas aûskulti matene. La E-ekspreso sciigis novaĵojn pri la Esperanto-movado en la mondo kaj en Pollando, pri la komence de majo en Varsovio okazinta interlingvistika seminario kun intervjuoj de partoprenantoj el Pollando, Italio, GDR, Hungario. La posttagmezaj elsendoj okupas sin nun post la tagĵurnalo pri politikaj eventoj en Pollando kaj en la mondo kaj pri polaj aferoj pli amplekse ol antaûe, kion certe bonvenigas tiuj aûskultantoj, kiujvolas uzi Esperanton kiel rime-don por informiĝi pri aktualaj okazaĵoj sur la politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj kampoj. <u>Sofio</u> dimanĉe matene disaûdigis paroladon pri la defendo de la natura medio fare de la ŝtato kaj socio.– <u>Zagrebo</u> rakontis pri moderna fabelo de bosnia junulo, kiu vojaĝis per turistvizo al Hagen, FRG, senpermese tie laboris, ludis en la okcidentgermana loto kaj gajnis 500 000 germanajn markojn.

**SENPAGE AL POLLANDO !**

Senpagan rondvojaĝon tra Pollando kaj multajn objektajn premiojn oni povas gajni en la nova konkurso-enketo de la POLA RADIO.

Por partopreni en la lotado de la premioj oni devas respondi al almenaŭ unu el la jenaj demandoj:

1. Kioman lokon, laŭ via opinio, Pollando okupas en la mondo laŭ la vidpunkto: de la areo de la lando, nombro da loĝantoj, industria produktado?
2. Kiuj polaj varoj kaj servoj ĝuus sukceson en via lando? Kiuj pliaj ebloj, laŭ via opinio, ekzistas en ĉi tiu sfero?
3. Kion vi opinias pri la aktuala rolo de Pollando en Eŭropo kaj en la mondo?

La respondojn oni sendu laŭ la adreso: POLA RADIO, Esperanto-Redakcio, oo-950 Varsovio, P.O.Box 46, Pollando, ĝis la 15-a de junio 1974 / decidas la dato de la poŝta stampo/.

La rezultoj de la konkurso-enketo estos anoncitaj en la elsendoj de la Pola Radio la 30-an de junio 1974.

Ni deziras al vi bonŝancon en la lotado de la premioj!

Samtempe ni informas, ke la Esperanto-elsendoj de la Pola Radio estas aŭdigataj tri fojojn tage:

| | | |
|---|---|---|
| 6,oo h | ondolongoj: | 200 m, 31 m, 49 m |
| 16,30 h | ondolongoj: | 31 m, 41 m |
| 22,30 h | ondolongoj: | 200 m, 49 m |

La elsendo-horoj estas indikitaj laŭ la mezeŭropa tempo.

Al ĉiuj esperantistoj ni volonte disponigos la presitan program-informilon pri niaj Esperanto-elsendoj.

POLA RADIO